



Estrara Komunikado EKO 2017-35 sendita el Budapeŝto, la 20an de decembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

La Zamenhof-jaro atingis sian kulminon

Pli ol 150 personoj direktis sin al la 'urbo de lumo' por partopreni la konferencon okazigitan kadre de Unesko en ĝia prestiĝa sidejo, por marki la finon de la Zamenhofa Jaro 2017. Tiu kunsido rezultis el grandegaj fortostreĉoj de la Unesko-teamo de UEA en Parizo kaj aliloke. Antaŭis ĝin AMO 41 (vidu EKO 34), kaj postsekvis fruktodona kunsido kun la ĉefredaktoro de la Unesko-Kuriero (vidu EKO 33). Nun okazas io nekutima por EKO. Ni transdonas la vorton al juna esperantistino, Nicoleta Enache, el Rumanio, kiu troviĝas meze de unujara volonulado en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Ŝi estas tute freŝbakita esperantisto, ekzemplo de tiuj personoj, kiujn nia Asocio devas ege kuraĝigi. Sekve ni donas al ŝi la vorton. En la suba teksto via EK-isto intervenis nur pri kelkaj faktoj, pri nenio alia. En unu alkroĉita PDF, vi trovas la plene originalan version de ŝia raporto. Dua alkroĉaĵo prezentas la nunan tekston kune kun galerio de pliaj fotoj de la aranĝo. Nun, la vorto al Nicoleta:

“La 11-an de decembro mi havis la ŝancon partopreni la memorkonferencon por la centa datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof. La memorkonferenco "Tutmondiĝo, Interreto kaj Unesko-Kuriero" okazis en la salono II de la sidejo de Unesko, en Parizo kaj kunigis pli ol 100 homojn el pluraj landoj. Inter la partoprenantoj estis multaj esperantistoj, reprezentantoj de membro-ŝtatoj de Unesko kaj oficistoj de Unesko.

Partopreni en en tiu ĉi evento donis al mi valorajn lernajn spertojn. Ekzemple, la evento estis granda okazaĵo por kunvenigi homojn kun tia riĉa sperto, interagi kaj interŝanĝi bonajn praktikojn. Rigardante malantaŭen al la konferenco, ne estas por mi facile resumi ĉiujn valorajn ideojn, kiuj estis dividitaj dum la tago. Mi mencias sube kelkajn el la ĉefaj ideoj, kiujn mi prenis kiel personajn lernaĵojn.

La konferenco estis dividita en tri partoj – malfermo, unua parto kaj dua parto. La malfermo komenciĝis per la alparolo de Krystyna Zurek, konstanta delegito de Pollando ĉe Unesko, kiu direktis la atenton de la partoprenantoj al la ĉefa temo de la konferenco kaj substrekis ĝian gravecon. Ni havis ankaŭ la okazon aŭskulti la vortojn de Maryse Wanda Zaleski-Zamenhof, la pranepino de L.L. Zamenhof, kaj la vidpunkton de Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA. Nome de Unesko parolis s-ro Frank La Rue, la Asista Direktoro de Unesko por Komunikado kaj Informado.



Margareta Zaleski-Zamenhof salutas, Krystyna Zurek alrigardas.



Dekstre: s-ro Frank La Rue.

La du partoj de la konferenco estis strukturitaj jene:

Unua sesio:

Sabastien Moret: "Kial Esperanto venkis." (sur la suba foto maldekstre)

Jean-Claude Lescure: "Esperanto fronte al tutmondiĝo."

Guilherme Fians: "Esperanto nuntempe kaj fronte al sia estonto: komunumo kaj siaj komunikiloj."

Dua sesio:

Chuck Smith: "La modernaj komunikiloj serve al Esperanto." (sur la foto meze)

Trezoro Huang Yinbao: "La Unesko-Kuriero en Esperanto."

Giorgio Novello: "Ĉu nova lingvo por Unesko?" (prezentita elektronike)

Ĉiuj intervenoj estis tre interesaj kaj riĉigis min per informoj kiujn mi ne konis antaŭe.



Mi specife interesiĝis pri kio helpis Esperanton daŭre disvastiĝi, kaj kiel malsamas Esperanto dise de aliaj artefaritaj lingvoj, kiuj naskiĝis en la 19a jarcento kaj ne plu vivas. La prezentataj prelegoj donis al mi pli da kompreno kaj klareco.

Mi plifortigis mian certecon ke Esperanto estas ne nur lingvo lerninda sed ankaŭ vigla movado kiu kontribuis al la disvolviĝo de internaciaj aferoj kaj disvastigo de inventoj kaj sciencaj novaĵoj. Esperanto pozitive influis turismon kaj vojaĝadon kaj eĉ permesis kontakton inter samaliancaj militpotencoj. Ĝi ankaŭ faciligis komunikadon inter esperantistoj, specife inter homoj el malsamaj kulturoj kaj kun malsamaj spertoj. Siamaniere Esperanto ŝanĝis la vivon de multaj homoj kaj ebligis interkomunikadon kaj lernadon. Ĉiuj el tiuj aspektoj pruvis ke Esperanto temas pri pli ol lerni lingvon, kaj ke ĝi kongruas kun la valoroj kaj vizioj de UN kaj Unesko.

Inter la temoj kiuj kaptis mian atenton estis la prelego de Chuck Smith pri la uzado de amaskomunikiloj kaj moderna teknologio serve al Esperanto. Prezentata kiel vojaĝo tra la tempo, la sesio montris kiel modernaj teknologioj ŝanĝis nian manieron komunikiĝi kaj bildigis la rimedojn kaj aplikajojn kiuj donis novan dimension al Esperanto.

Aldone al la konferenca sesio mi havis la ŝancon renkonti novajn homojn kaj interagi kun ili dum la paŭzoj. La ebleco interkonekti, lerni de unu la alia kaj esplori ideojn estis grandvalora sperto. Mi certe povas diri ke tiu konferenco estis sencoplana por mi kaj mi ĝojas esti partopreninto. Plie, mi deziras aldoni ke la tuta evento estis bone organizita kaj ĉiuj prelegantoj esprimis honestajn opiniojn rilate al sia temo kaj disdonis ege valorajn informojn.”

Vortoj: 720



Parto de la publiko montras la Unesko-kurieron, kiun ili ricevis donace. Videblas en la unua vico s-ro Louis C. Zaleski-Zamenof, kiu ne plu povas vojaĝi al foraj kongresoj, sed jes partoprenis la Konferencon. Foto: Brian Moon.



Parto de la publiko kun kontribuintoj al la programo en la unua vico. Interpretado okazis inter tri lingvoj.

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperitaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.